

Esperanto en Danio

18-a jarkolekto • n-ro 5 • decembro 2011



Unu el la kunvenejoj de la
dana-germana-pola kongreso 2012

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 50 38 41 77 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2012

Enhavo

Kongresante antaŭen!.....3

DEA jarkunveno 2012.....4

9-a kongreso de Eŭropa

Esperanto-Unio.....5

Forgesita verkistino: Gudrun

Riisberg.....6

Kopenhago.....9

El la “Internaciaj Tagoj”10

Paperaj gazeteltondaĵoj.....11

Næstved.....12

Opini-esprimo.....13

Kampanjo de “Lernu!”14

Tutmonda Skriba Sesio de la

KER-ekzamenoj.....15

Rondo Familia.....16

UEA en afrika kongreso pri

kulturo.....17

UEA kaj lingvodiverseco.....18

Esperanto-ekspozicio en

Aŭstralio.....21

Subteno al Vikipedio.....22

La unua Esperanta

Kinofestivalo.....22

La stato de aŭtomata

tradukado.....24

Grundtvig en Sicilio.....25

IKU invitas prelegontojn.....26

Tatoeba: 100 000 frazoj en

Esperanto.....27

Kongresante antaŭen!



Post nia sukcesa kunlaboro pri la 96-a UK en Kopenhago ni ĉiuj certe ripozis kaj retrovis nian kutiman labortempon, sed nun jarfine denove alvenis la tempo por plani pliajn aktivecojn. Mirinda estas la fakto ke pli kaj pli da interesaj internaciaj kunvenoj anoncas sin, kaj kelkfoje estas eĉ iomete malfacile decidi kien iri. Tamen mi rekomendas du eventoj por tiuj samideanoj, kiuj tamen ne planas iri al venonta

UK en Hanojo: temas pri nia jarkunveno kiu estas anoncita kiel komuna Dana-Germana kaj Pola kongreso en Berlino dum Pentekosto, kaj la 9-a Kongreso de EEU en Galivo, Irlando. Vi povas trovi pli da informoj pri tiuj du kongresoj interne de la revuo.

Por ni estas nova sperto aranĝi jarkunvenon eksterlanden, sed ricevinte la inviton de GEA ni decidis akcepti tiun defion, ĉar la kongreso certe estos pli bunta ol nia ĉiujara jarkunveno. Kunigitaj fortoj alportas pli da eblecoj pri pli riĉa programo kaj ekskursoj, kaj donas al la partoprenantoj eblecon konatiĝi kun novaj samideanoj.

Ni rekomendas ankaŭ partopreni la 9-an Kongreson de EEU en Galivo, Irlando. La nova prezidento de Irlando Michael D. Higgins estas la alta protektanto, kaj la ministrino pri EŬ-aferoj Lucinda Creighton malfermos la kongreson. Ni certe spertos apartan etoson kaj naturon en lando ne tiel konata ĉar ĝi situas en la periferio de Eŭropo.

Dum sia kopenhaga konferenco la Asembleo de EEU decidis proklami la jaron 2012 jaro de Tibor Sekelj. Pri tiu fama kaj unu el la plej gravaj esperantistoj ni informos en la venonta numero de nia revuo.

Fine mi deziras al ĉiuj niaj membroj Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron!

Ileana Schröder

DEA jarkunveno 2012

Kiel antaŭe anoncite, la jarkunveno 2012 okazos en Berlino kadre de la dana-germana-pola kongreso dum pentekosto de la 25-a ĝis la 28-a de majo 2012.

Pli detalajn informojn vi povas trovi klakante al nia hejmpaĝo www.esperanto.dk

kien ni ankaŭ enmetis la flugfolion kun la provizora programo kaj la aliĝilon. Por plifaciligi la transprenon de la aliĝkoto ni proponas al vi sendi la kotizon kaj la aliĝilon al nia kasisto Arne Casper (konto: reg 1551 konto10019621) kiu sendos la monon pere de UEA al la orgasnizanto. La kotizo por membroj de DEA estas 330 kr. ĝis la fino de la jaro kaj 405 kr. de la 1-a de januaro.

La kongreso okazos en du diversaj lokoj situantaj tre proksime unu de la alia: la granda salono por la inaŭguro kaj grandaj eventoj estas en Max-Taut-Halle, Schlichtalle en Berlin-Lichtenberg, dum la aliaj aranĝoj okazos en pli malgrandaj salonoj en Oranĝerio (klerigejo Kiezspinne). Estante internacia evento, nia jarkunveno estas certe tre alloga kaj interesa. Ni esperas vidi multajn el niaj membroj al tiu aranĝo.



Max-Taut-Halle, kie okazos la inaŭguro

9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio



Panoramo de Galivo

De la 16-a ĝis la 20-a de julio 2012 okazos la 9-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Galivo (Galway), Irlando. La temo de la kongreso estas "Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli. Pli detalajn informojn pri la programo hoteloj ktp. vi povas trovi en la hejmpaĝo de EEU ĉe www.europo.eu, kie vi ankaŭ povas aliĝi. Por plifaciligi la alsendon de la aliĝkotizo ni rekomendas al vi sendi la monon al nia kasisto Arne Casper, kiu sendos la monon pere de UEA al la organizanto. La aliĝkotizo ĝis la fino de la jaro estas 720 dkr. kaj ĝis la 31-a de marto 900 dkr. Sendu la aliĝkotizon al la konto reg.: 1551 n-ro 10019621.

Eĉ se oni ne povas rekte flugi, estas tamen tre facile atingi Galivon. Estas du aŭtobuskompanioj (Citylink kaj Gobus) kiuj havas aŭtobusojn rekte de la Dublina flughaveno al Galivo. Ambaŭ havas aŭtobusojn kiuj veturas ĉiuhore de la Dublina flughaveno. Estas vere simple trovi la stacion ĉe la flughaveno kaj oni rekte alvenas en la centro de Galivo. La kongresoj de EEU estas ĉiam interesaj kaj allogaj, do ni esperas ke multaj el niaj membroj prenos la okazon ĉeesti la kongreson!

Forgesita verkistino: Gudrun Riisberg

En nia klubejo abundas malnovaj libroj Esperantaj, jen la heredaĵoj de forpasintaj samideanoj kaj kluboj. De tempo al tempo iom vendiĝas per kluba aŭkcio, kaj per tio la monkonto de Esperanto-domo aŭ de K.E.K. modeste profitas.

Antaŭ kvin jaroj du el la libroj, kiujn mi tiel ekposedis, estis la novelaro ‘Suno kaj Pluvo’ (1972) kaj la tradukaĵo ‘Kit Vivas’, de la dana romano de Jytte Lyngbirk ‘Rejse med Kit’ (1973). La verkinto/tradukinto estis Gudrun Riisberg. Ambaŭ libroj estis eldonitaj de Dansk Esperanto-Forlag, kiu ‘forpasis’ en la jaro 1979.

La novelaro, kiun mi ĵus relegis kun granda plezuro, enhavas 15 novelojn, kies rakontoj temas pri okazaĵoj kaj dilemoj ordinaraj kaj neordinaraj ĉe normalaj homoj; amo, deprimado, soleco, patrineco, dombestoj, geedzaj interrilatoj, intergeneraciaj rilatoj kaj virinaj rajtoj. En la amuza sed amara rakonteto ‘La birdoj de onklino Maria’ ruza geedza paro promesas al la ‘hereda’ onklino bone prizorgi ŝiajn amatajn papagetojn dum ŝia ferio en Kopenhago. Pro akcidento en la apuda strato kaj malfermita fenestro la papagetoj bedaŭrinde forflugis kaj neniam revenis. Kvankam la birdo-prizorgantoj trovis tutsimilajn papagetojn, ili malsukcesis trompi la onklinon, kaj ili “vidis la heredon malaperi kun la birdoj en la bluan aeron.” Per tiu simpla ĉiutaga rakonto Gudrun Riisberg pensigas nin pri ĉiamaj dilemoj; soleco, avareco kaj malbonaj intergeneraciaj rilatoj. El lingvaĵa vidpunkto la libro estas leginda pro la simpla kaj bonstila teksto.

La relegado de la novelaro inspiris min demandi al mi, kiu do estis Gudrun Riisberg kaj kio estis ŝia kontribuo al nia kulturo?

Rete mi trovis malmulte da informoj pri ŝi. Ĉe OLE (Originala Literaturo Esperanta, ĉe esperanto.net/literaturo) troviĝis nur ‘Suno kaj pluvo’ kaj Gajaj klubvesperoj (skeĉoj & ludoj).

Pli informa estis Vikipedio. Laŭ ĝi, Gudrun Riisberg estis dana verkistino loĝanta en Jutlando (Århus). Aŭtune 1936 ŝi esperantistiĝis. Ekde 1935 ŝi verkis danlingvajn novelojn, kiuj aperis en gazetoj kaj revuoj. Post la emeritiĝo ŝi tradukis Esperanten 15 el siaj noveloj. En 1972 la novelaro

estis eldonita sub la titolo ‘Sunu kaj Pluvo’ de la dana eldonejo Dansk Esperanto-Forlag en Åbyhøj Danio.

En la katalogo de la Esperanto-Muzeo en Vieno troveblas jena listo de tradukaĵoj kaj verkoj ŝiaj:

Lyngbirk Jytte - Kit vivas 1973.

Fisker Robert - Morse-klubben Morso-klubo 1973.

Christoffersen Rigmor - Else kaj Bo. 1974.

Hermansen Knud - Grete og Jep. Grete kaj Jep 1975.

Hansen Eva Hemmer - Bodil og Pigebanden. Bodil kaj la bando 1976.

Nielsen Torben - Venis Viro 1976.

Krom Sunu kaj Pluvo, eldonita en 1972, Gudrun Riisberg verkis du librojn pri instruado kaj kluba agado:

Gajaj klubvesperoj. Skeĉoj kaj ludoj. 1970

Gajaj klubvesperoj 1971.

Alia bona informfonto estis la esperantistaro dana; do kion oni memoras pri ŝi?

En oktobro 1962 ŝi unuafoje instruis Esperanton al infanaj komencantoj en la Sporta Altlernejo en Vejle. Dum la 1980-aj jaroj ŝi estis redaktoro de la porinfana gazeto ‘Infana Klubo 10’. En ‘Esperanto Lærebog’ de Kristian Langgaard, eldonita en 1951 de Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, estas duparta teksto de Gudrun Riisberg – ‘Geedziĝo 1904, Geedziĝo 1934’. La sama novelo troviĝas en Sunu kaj Pluvo. (Dankon al Mogens Rude Andersen pro la informo.)

Aliaj samideanoj memoras ŝin kiel agema sed iom rezerviĝema samideano. Profesie ŝi estis kontoristo ĉe la kooperativa vendej-ĉeno F.D.B. en Albertslund, kie ŝi loĝis dum la 1960-aj jaroj. Oni ankaŭ scias, ke Gudrun Riisberg estis blinda dum siaj lastaj jaroj. Nenie estas informo pri la dato kaj loko de ŝia naskiĝo, nek la dato de ŝia forpaso.

En Dansk Esperanto-Blad dum la jaroj 1961–1971 troviĝas 16 recenzoj, kiujn Gudrun Riisberg verkis pri romanoj, poemaroj kaj lerno-libroj. En la numero de julio-aŭgusto 1961 legeblas jena artikolo ŝia: ‘Ĉiam – ĉiam – ĉiam. (portu la stelon)’, kiu donas impreson de ĉarme entuziasma

samideano, kies amegon al Esperanto ŝi kunportis ie ajn. Gudrun Riisberg malavare monkontribuis al C.D.E.L. kaj dum kelkaj jaroj ŝi ankaŭ estis estrara anstataŭanto.

Dum la sesdekaj jaroj ŝi loĝis unue en Taastrup kaj poste en Albertslund. Laŭ la rubriko ‘Informetoj’ en la aŭgusta numero 1965 de Dansk Esperanto-Blad aperis jeno: ‘En Albertslund Posten (loka gazeto por nova urbo apud Kopenhago) aperis intervjuo kun Gudrun Riisberg pri Esperanto, pri ĝia disvastiĝo kaj pri instruado de Esperanto en la versperlernejo dum la venonta sezono. En la gazeto estas rubriko por aliĝo al la kurso. F-ino Riisberg faras aktivan laboron sur la kampo de instruado, kaj ni instigas al aliaj imiti la ekzemplon de F-ino Riisberg.’

Laŭ la artikolo de Albertslund-Posten ŝi esperantistiĝis en la jaro 1936 kaj partoprenis en la jaro 1937 (aŭguste) sian unuan internacian aranĝon en Mols kune kun 170 esperantistoj el 10 landoj. Ŝi komencis instrui la lingvon en la jaro 1958.

En la lasta numero de Dansk Esperanto-Blad de marto 1972 oni skribas:

‘Ĵus aperis libro de Gudrun Riisberg, konata al ĉiuj legantoj de D.E.B pro ŝiaj recenzoj, SUNO KAJ PLUVO, 15 noveloj pri temoj variaj kiel suno kaj pluvo: de kortuŝa melankolio, tra streĉa dramatiko ĝis malpeza gaja humoro. 80 paĝa.’

Ĉu aperis aliaj recenzoj pri la novelaro aŭ pri ŝiaj aliaj verkoj kaj tradukaĵoj? Ĝis nun mi ne havis la tempon traserĉi la poste aperintajn revuojn.

Ĉu fakuloj scias pri la novelaro? Almenaŭ ĝi ne estas menciita en ‘Concise Encyclopedia of the original literature of Esperanto 1887–2007.’

Kiom da aliaj merituloj kaj kulturaĵoj ni riskos forgesi? Post la supraĵa legado de la revuoj, ŝajnas al mi ke la respondo estas TIOM.

Krom al Mogens Rude Andersen, mi aparte dankas al Jytte Sunekær, kiu kunportis la pezajn revuojn al la klubejo, kaj Bent Holm-Laursen, kiu posedas la kopirajton, kaj permesis al mi reaperigi rete la unuan novelon ‘La birdoj de la onklino’.

Betty Chatterjee

Kopenhago

Programo ĝis marto 2012

Januaro

- 9: Betty Chatterjee rakontos pri sia vojaĝo al Tajlando.
- 16: Konversacia Rondo pripensanta pri la artikolo de Trevor Steele ‘Ĉu malesperi?’ (legebla ĉe <http://sezonoj.ru/2011/10/steele/>).
- 23: Komuna manĝa kaj filma vespero. La filmo daŭras 1 horon.
La unua fikcia filmo plene en la Internacia Lingvo estis “Angoroj”, produktita de J. L. Mahé en Parizo. Jen kriminala filmo, en kiu la ĉefajn rolojn ludas geaktoroj S. Flego, Marc Darnault kaj Jana Flego-Ravŝelj. La filmo estis prezentita en diversaj lokoj, plej multe dum la Tria Internacia Arta Festivalo en Budapeŝto (1966).
- 30: Junulara Vespero. Temo anoncota.

Februaro

- 6: Dum la Universala Kongreso en Kopenhago Lene kaj Jan Nieman prelegis pri Gronlando. Ni nun bonŝancos ĝui/reĝui la prelegon.
- 13: DEA gvidos la kunvenon. Informoj sekvos.
- 20: Jarkunveno de KEK. La tagordo, la raporto de la prezidanto kaj la kalkulaĵoj estos senditaj meze de januaro.
- 27: Junulara Vespero. Temo anoncota

Marto

- 5: Prelego ‘Cifereca kaj reta indenteco de individuoj’. Amir. Hažiahmetović.

La kunvenoj de KEK komenciĝas je la 19-a kaj finiĝas je la 21-a. La adreso estas: Tomsgårdsvej 35, 2400 Kobenhavn NV. Cetere la kluba programo legeblas ĉe la Facebook-grupo ‘Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo’.

La kunvenoj ĉiam komenciĝas je la 19-a. La kluba kontaktulo estas:

Betty Chatterjee +45 38 89 10 13 chatterjeebetty@hotmail.com

El la “Internaciaj Tagoj”



La Internaciaj Tagoj de la komunumo de Kopenhago okazis semajnfine la 3-4-an de septembro. Bent Jensenius kaj Betty Chatterjee preparis Esperanto-budon.



Ankaur Jytte, Aleksandro, Michael, Ana, Gosia kaj aliaj venis al la budo.



Fine Amir kaj aliaj muzikistoj el Espo-Despo muzikis. Bedaŭrinde dum densa pluvado.

Paperaj gazeteltondaĵoj

- 05.09.2011 Hjemmet: Krucvortenigmo
12.09.2011 Hjemmet: Krucvortenigmo
27.09.2011 Næstved-Bladet + Ugebladet Næstved + 01.10.2011 Næstved-Bladet Go' weekend + 03.+04.10.2011 Sjællandske Næstved: Prelego de Hernan Gonzalez pri Handi-Art
10.2011 Jernbanefritid: Bivirkninger – på den gode måde
22.10.2011 Dagbladet, Frederiksborg Amts Avis, Sjællandske: Artikolo pri Volapyk, en kiu Esperanto estis menciita
01.11.2011 Næstved-Bladet + Ugebladet Næstved + 05.11.2011 Næstved-Bladet Go'weekend + 07.+08.2011 Sjællandske Næstved: Prelego de Lene Nielsen pri Artlernejo por handikapitoj
07.11.2011 Hjemmet: Krucvortenigmo
08.11.2011 Ugebladet Næstved: Asocia registro, i.a. EUN
14.11.2011 Hjemmet: Krucvortenigmo

Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen,
Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝohoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj.

Okazos:

Kiel antaŭe anoncite, ni ek de la aŭtuna sezono 2011 kunvenas **mardojn**.

Ma 13.12 je h 14.00: Jularanĝo kun fromaĝo, kolbaso, pano kaj trinkaĵoj + komuna ujutno.

Post tio: Agrablajn julfestojn kaj bonan, prosperan novan jaron!

Ma 10.01 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 46 de *Faktoj kaj Fantazioj* + konversacio.

Ma 31.01 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 47 de *F+F* + konversacio.

Ma 07.02 je h 19.30: Danlingva prelego aŭ alia program. Ne decite.

Ma 21.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN.

Ma 28.02 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro **49** de *F+F* + konversacio. (Rim.: Ni ne uzos ĉap. 48).

Ma 06.03 je h 19.30: Danlingva prelego: Lene kaj Jan Niemann pri novaj travivaĵoj en Laoso.

Ma 27.03 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 50 de *F+F* + konversacio.

Ma 10.04 Sezonfino. Pliaj detaloj poste.

Okazis:

Krom la anoncitaj studgrupaj posttagmezoj, kiuj nun estas pli viglaj, ĉar Liss-Lotte paroligas nin, ni spertis du danlingvajn prelegojn kun iom specialaj, sed similaj temoj: 4.10. Hernan Gonzalez vigle rakontis pri la ekspozicio Handi-Art kun plej diversaj ekspoziciaĵoj fare de divers-handikapitaj plurlandaj artistoj, kaj 8.11. Lene Nielsen pri sia artlernejo por handikapitoj kaj aŭtismuloj.

Opini-esprimo

Valora scio: protektado de lingvoj.

Ĉiu etna lingvo estas trezoro de la mondo; trezoro reprezentanta gravan valorajon de nia komuna heredaĵo. Daŭre etnaj lingvoj estas subfosataj kaj pereas, kaj samtempe la mondscale plej uzataj naciaj lingvoj disevoluas al multegaj dialektoj kaj ĵargonaj lingvaĉoj kaj pro tio, ĉiu el tiaj lingvoj ekzistas en ega danĝero perdi sian originan etnan ecaron.

Per la internacia uzado de ĉies universala neŭtrala mondlingvo kaj la hejma uzado de sia propra etna lingvo oni malhelpas la erozion de lingvoj.

Esperanto estas ilo por asisti la homaron; donante al la mondo la eblecon de neŭtrala tutmonda komunikado kaj per tio paralele, la hejman ŝancon senĝene uzi kaj protekte vivteni la individuan karakteron de sia indiĝena lingvo.

Esperantistoj strebadas al la protektado de ĉiuj lingvoj.

Ekonomia malegaleco.

Estiĝas multe diversaj specoj de ekonomia malegaleco pro la disvastigado de lingvoj. Lando, kies lingvo, internacie, estas plej vaste uzata, gajnas interalie grandegan avantaĝon de enspezo je la kosto de malpli vaste uzataj lingvoj kaj ties popoloj. Temas pri enormaj sumoj; kaj tia maljusta lingvo-disvastigado interalie pro vivtenado kaj laborebleco, ofte devigas popolojn de malpli fortaj lingvoj aliĝi al vaste uzata fremda lingvo, kaj per tio, minoritataj popoloj riskas perdon de sia origina lingva identeco kaj formorton de sia gepatra lingvo.

La monda akceptado de neŭtrala homarkomuna lingvo kiel Esperanto kreus pli justan ekonomian ekvilibron inter ĉiuj landoj kaj iliaj labor-kadroj: komerce, amaskomunikile, interrete ktp. – en scienco kaj kulturo kaj rilate ĉiujn oficialajn publikaĵojn.

Esperantistoj celas justecon por ĉiuj lingvokomunumoj.

K.T. Thurø

E-o laborcentro

Nykøbing S, Danio

PS. Koncerne ‘ekonomion kaj lingvon’ la laborcentro rekomendas la libron de profesoro Robert Phillipson: Ĉu nur-angla Eŭropo?

Kampanjo de “Lernu!”

Kara Amiko,

Antaŭ dek jaroj Esperantic Studies Foundation (ESF) financis grupon de entreprenemaj gejunuloj por fondi la retejon Lernu.net. Ni estis konvinkitaj, ke tio helpos al la nova generacio lerni Esperanton, kaj tiel ni povos konektiĝi kun homoj, kiujn ni ne povus atingi antaŭe.

Sed la sukceso de tiu ĉi iniciato superis ĉiujn niajn atendojn. “Lernu” fariĝis vigla reta komunumo kun pli ol 106 mil uzantoj (kaj la nombro daŭre pligrandiĝas), kun pli ol cent mil paĝrigardoj ĉiutage! Hodiaŭ la retejo estas konata ĉie tra la mondo: fakte, estas uzantoj de “Lernu” en 240 landoj kaj teritorioj!

Esperanto prosperas en la reto kiel neniam antaŭe, aparte en Eŭropo kaj Ameriko. Dank al Lernu.net, homoj de la tuta mondo povas lerni Esperanton senpage, sperti nian kulturon kaj fariĝi parto de la komunumo. Oni lernas Esperanton ankaŭ en landoj, kie ne ekzistas landaj asocioj aŭ tradiciaj kursoj. Pluraj Lernu-uzantoj fariĝas aktivaj ankaŭ en la tradicia Esperanto-movado, kaj la ĉiujara Lernu-renkontiĝo fariĝis unu el la plej grandaj Esperanto-eventoj.

Tiu ĉi sukceso ŝuldiĝas multe al entuziasmo, talento kaj miloj da horoj da volontula laboro. Sed “Lernu” (kaj aliaj retaj projektoj) ne estus ebla sen la granda investo de ESF. Fakte, ni subtenis ĝin ekde la unua plan-fazo, tra ĝia tuta kresko kaj sukceso, doninte pli ol kvaron-milionon da usonaj dolaroj ĝis la fino de 2010.

Nun, kiam alproksimiĝas la 10-a datreveno de Lernu, ni kredas ke ĝi havas eĉ pli da potencialo por kresko. Lernu nun estas refarata por fariĝi finance memstara. La nova Lernu provizos gamon da novaj servoj por faciligi aĉetojn, vendojn, abonojn, eventojn kaj donacojn inter individuoj kaj grupoj. Tiuj servoj estos disponigitaj ne nur al la Lernu-uzantoj, sed ankaŭ al tradiciaj Esperanto-organizoj kaj al ĉiuj, kiuj parolas kaj uzas Esperanton, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj simple volas subteni la lingvon. Ni esperas, ke tiu ĉi paŝo ankaŭ instigos la integriĝon inter la reta komunumo kaj la landaj kaj lokaj Esperanto-asocioj kaj organizoj.

Kompreneble, la disvolvigo de “Lernu” bezonas sufiĉe grandan aldonan investon de ESF, kaj pro tio, ke la Fondaĵo subtenadas ankaŭ plurajn aliajn projektojn kaj iniciatojn, tiu tasko postulas komunan strebon grandigi la

ESF-kapitalon. Kiel parto de tiu ĉi strebo, la organizo E@I (mallongigo de Esperanto@Internet) lanĉis la donac-kolektan kampanjon “100 000 eŭroj por ESF”.

En lastatempa intervjuo la vic-prezidanto de ESF Mark Fettes notis: Kun la reta epoko, nia mondo malkreskis, kaj multege kreskis la eblecoj rapide komuniki, decidi kaj agi. Iom post iom nia tuta movado devos adaptiĝi al tio, sed ESF jam montras la vojon, subtenante promesplenajn iniciatojn sur la kampoj de edukado, scienco kaj teknologio. Se vi donacos al ESF, vi povos esti certa, ke via mono uziĝos por konkretaj projektoj, bone mastrumataj, kiuj altigos la prestiĝon, videblecon, kaj uzindecon de Esperanto en epoko de tutmondiĝo.

Ni petas vin konsideri fariĝi ESF-donacanto. Vi povas donaci unufoje aŭ ĉiumonate, per la reto aŭ per la ĉeko. Kiel donacanto, vi estos rekonita sur nia virtuala “Muro de Donacantoj” de nia retejo.

Por lerni pli, vizitu nian retejon: esperantic.org, aŭ la retejon de la kampanjo “100 000 eŭroj por ESF”: kampanjo.ikso.net.

Amike,

Humphrey Tonkin, Prezidanto, Esperantic Studies Foundation

Donac-informoj:

UEA-konto: esfo-p

Retaj donacoj: Kampanjo “100 000 eŭroj por ESF”: kampanjo.ikso.net, aŭ

Donac-paĝo de ESF: esperantic.org/eo/donacoj/rete

Tutmonda Skriba Sesio de la KER-ekzamenoj

Venis peto de pluraj asocioj kaj kluboj pri deziro okazigi KER-ekzamensesion per kiu ili ŝatus fermi sian jaran lingvokurson.

Tio donus bonajn motivojn kaj celojn dum la tuta jaro por diligente lerni la lingvon kaj atingi certan nivelon.

La ekzamena komisiono de UEA studis la eblojn kaj decidis oferti tutmondan skriban ekzamensesion por la 9-a de junio 2012.

Kluboj, kursoj, eĉ kun malmultaj kandidatoj povas profiti je la okazo kaj peti okazigon de ekzamensesio en la propra urbo.

Legu pli ĉe la paĝo: <http://edukado.net/novajhoj?id=186>

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net.

Rondo Familia

“Rondo Familia” estas asocio de la familioj ke Esperanto estas uzata. Post eksperimenta periodo oni konkludis ke la elŝutado de Familia Esperanto – la bulteno de Rondo Familia – denove estu senpaga kaj la kontribuo (al UEA-konto idoj-p) estu libervola kiel estis antaŭe.

La jubilea n-ro (50) de FE estas escepte interesa kaj enhaviĉa. Ĝi estas nun libere elŝutebla en la retejo de Rondo Familia: uea.org/rondo_familia.

Interalie la 13-paĝa reta bulteno enhavas riĉe ilustritajn artikolojn pri:

- Klopodoj por verdigi togolandan familion (Kokou SAGBADJELOU) – paĝo 2
- Solvo de la enigmo pri ‘Deda Mraz’ – la festo de la sun-reveno (Johan Derks) - 3
- Ege interesa Analizo de Internacia Junulara Kongreso en Kievo (Carolin Weemeyer) - 4
- Amrilatoj en Esperanto: personaj intervjuoj - 6
- Esperanto: ĉu Fundamenta, postFundamenta aŭ preterFundamenta? (enketo) - 8
- Tradicia Renkontiĝo de Esperantaj Familioj en Lesjofors, Svedio (Vanja Radovanovic) - 9
- Kalendaro de venontaj familiaj aranĝoj - 10
- Unua Internacia Esperanto semajno en Armenio (Susanna Baghdasaryan) – 10

Tri tagojn post la dissendo de tiu mesaĝo, la nombro de elŝutoj sesobliĝis al 400 kaj daŭre kreskas. La konkludo estas evidenta: kulpis ne la ŝrumpo de la nombro de interesitoj pri Rondo Familia, kiel opiniis la redaktoro, sed la deviga pago enkondukita ĉe tiu numero kaj la teknika komplikigo kaŭzita de tio. Nuliginte la devigan pagon (anstataŭe eblas donaci al UEA-konto idoj-p) la elŝutado revenis al ĝia antaŭa nivelo kaj pli.

La interesiĝo pri Rondo Familia ne falis do, eventuale ĝi eĉ kreskas, kaj vi povas ĝin helpi disigante ĝian bultenon Familia Esperanto en viajn landajn kaj lokajn Esperanto-instancojn, aparte al Esperanto-familioj kaj gejunuloj.

Amri Wandel

UEA en afrika kongreso pri kulturo



Nome de la Afrika Komisiono de UEA mi partoprenis la Unuan Tutafrikan Kongreson pri Kulturo. Ĝin organizis sub la aŭspicioj de la togolanda registaro la Afrika Reto de Kultur-Iniciatintoj kaj Entreprenistoj (RAPEC) kun la temo “Kulturo, ilo por evoluo en Afriko” la 17-an kaj 18-an de novembro en Lomeo.

Okazis laŭtemaj prelegoj kaj atelieroj, interalie pri vivantaj spektakloj, eldonado/distriburetoj, modo, belartoj kaj bildarto/komunikado. En la lasta, kiun prezidis la ministro Cornélius Aidam, mi intervenis, kiam leviĝis la problemo pri harmoniigo de rilatoj inter kulturaj agantoj en Afriko. Mi proponis Esperanton kiel kontaktan lingvon inter afrikanoj kaj inter Afriko kaj la cetera mondo. Kvankam mia propono ricevis komenteton flanke de la gvidanto, ĝi ne eniris la finan deklaron de la kongreso. Mi ĝojas pri la partopreno en la diskutoj, ĉar tiel mi povis almenaŭ semi la grajnon en la kapojn pri nia lingvo. Plie, kun helpo de sinjoro Kouevigan Koffi, eksa sekretario de la landa asocio en Togolando, mi disdonis centojn da varbiloj al gekongresanoj kaj havis private kun kelkaj el ili viglan diskuton pri Esperanto.

Pluraj centoj da homoj el preskaŭ ĉiuj afrikaj landoj ĉeestis la kongreson, kiun malfermis la nuna ministro pri artoj kaj kulturo s-ro Yacoubou Koumadjo Hamadou en la konferencejo de la regiona banko BIDC. La konkludoj de la laboroj de tiu tutafrika renkontiĝo estos prezentitaj al politikaj decidantoj de afrikaj landoj, al Afrika Unio kaj al diversaj institucioj.

Ĉar revu unufoje estas simpla revo, sed revu dufoje estas komenco de la realigado, la Afrika Komisiono kaj mi ĉiam pli decide intencas partopreni en tiaj aranĝoj por disvastigi Esperanton en la tuta Afriko. Tion ni povos fari nur helpe de donacoj al Fondaĵo Afriko de UEA.

Adjé Adjévi
Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA

UEA kaj lingvodiverseco ĉe UN

La forumo

Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la ĉi-jaran Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado (DPI) de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn (Germanio) de la 3-a ĝis la 5-a de septembro. Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-j okazis por la 64-a fojo kaj havis la temon “Daŭrigeblaj socioj – respondecaj civitanoj”.



Stefano Keller

La konferencon malfermis Kiyō Akasaka, asista ĝenerala sekretario de UN pri komunikado kaj publika informado. Ĝenerala sekretario Ban Ki-Moon salutis la inaŭguron per videomesaĝo.

Kiel delegitoj de UEA partoprenis Marcus Cramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontaktkartojn.

Kolao kaj indiĝenoj

La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante interalie tion ke nur la angla estas laborlingvo de la konferenco. Al la demando de Keller pri la kialo, Maria-Luisa Chávez, ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-j, respondis, ke tion kaŭzis nur manko de mono. Ankaŭ ŝi bedaŭris la neblon uzi pli da lingvoj.

Dum unu el la rond-tablaj diskutoj Keller revenis al la afero post elpaŝo de reprezentanto de PepsiCo, kiu prezentis la klopodojn de sia firmao subteni la evoluon en la diversaj mondopartoj, kie ĝi fabrikas kaj vendas siajn varojn. Keller demandis, ĉu PepsiCo ne povus per subvencio ebligi ankaŭ uzon de aliaj oficialaj lingvoj de UN ol nur la angla ĉe similaj konferencoj, se ĝi jam faras tiom vastan “homhelpan” laboron. La estrarano de UEA ricevis la respondon, ke pri tio oni skribu al la oficejo de PepsiCo. La sama respondo venis ankaŭ al lia demando, ĉu la firmao, kiu ĉeestas en tiom da lingvoregionoj, ne povus meti ankaŭ Esperantajn vortojn sur siajn varojn.

Ĉe la rond-tabla diskuto pri civitana partopreno, Mélanie Maradan de-

mandis, kiel la prelegantoj imagas la partopreneblon en tiu diskuto kaj en surloka agado ekzemple de indiĝenaj popoloj, se oni uzas nur la anglan. Ŝi rimarkigis, ke ĝuste la koncernatoj ne povas partopreni en la diskuto kaj ke en la konferenco multaj reprezentantoj ne povas interveni pro nesufiĉa kono de la angla. Maradan demandis, kion oni intencas fari por solvi tiun problemon, sed ŝi ne ricevis respondon.

Laborgrupoj

La delegitoj de UEA ĉeestis kelkajn laborgrupojn, kie ili aldonis al la diskutoj menciojn pri la neceso konsideri la rajton de ĉiu popolo je uzo de sia gepatra lingvo kaj je plukultivado de sia kulturo.

En kunsido kun la ĉefino kaj la stabo de la NRO-rilatada oficejo de UN Stefano Keller alparolis en Esperanto kun angla interpretado de Marcos Cramer. Li komentis diversajn kontakt- kaj informkanalojn de UN, kiu pli kaj pli uzas Facebook, Twitter kaj Youtube por rilati kun la civila socio. Kiel ekzemplon pri la agado de UEA, Keller menciis la novan retejon kreitan en Novjorko, kiu informas la esperantistaron pri la laboro de UN. Manfred Westermayer alparolis pri projekto realigata de esperantistoj en Afriko.

Tekstoprilaboraj problemoj

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto tute silentis.

La lastan tagon oni prezentis la kune finverkitan deklaron de la konferenco, el kiu tamen mankis la mencioj pri lingvaj rajtoj proponitaj de UEA, pri kiu ellaso Maradan protestis. Du el la tekstoprilaborantoj estis favoraj al lingvaj rajtoj, kaj private venis al Keller por sugesti denovan aldonon de la modifproponoj de UEA en la jam plulaboritan tekston. Tion Keller kaj Maradan faris, dum iliaj kolegoj Cramer, Noe kaj Westermayer plu kontaktadis reprezentantojn de aliaj organizaĵoj.

Ankoraŭ dum kelkaj tagoj la respondeculoj pri la fina deklaro plu laboris pri ĝia teksto laŭ la lastminutaj plendoj kaj aldonproponoj. Kiel ajn, kiel rezulto de la partopreno de UEA en la konferenco restos, ke la ĉeestintoj aŭdis pri lingvaj rajtoj, pri Esperanto kaj pri UEA. Sekve ili eksciis pri la

defendado de lingvaj minoritatoj fare de esperantistoj kaj pri la uzo de Esperanto por interetna kompreniĝo, dialogo kaj komunikado.

Plena sukceso de UEA

Tamen, la amendoj pri lingvaj rajtoj, proponitaj de UEA, eniris la definitivajn version de la fina deklaro! Post la konferenco la respondecoj pri la fina deklaro daŭrigis la traktadon de la ŝanĝoproponoj, akceptante ĉiujn faritajn de la delegitaro de UEA.

“Neniam mi vidis tiom da mencioj pri lingvo, lingvaj rajtoj kaj diverseco en UN-dokumentoj”, komentas kun kontento Stefano Keller, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj. “En la originala projekto de la deklaro la vorto ‘lingvo’ aperis eĉ ne unufoje”, li aldonas. “Eĉ du kompletaj novaj alineoj proponitaj de UEA estis akceptitaj.” La plej rimarkinda el ili troviĝas inter la rekomendoj al “Rio + 20”, t.e. Konferenco de UN pri Daŭripova Evoluo, okazonta en Rio-de-Ĵanejro en junio 2012. Ĝi tekstas:

“Ni alvokas por respekto al kaj inkludigo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinita klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova.”

Lingvo kaj biologio

Laŭ iniciato de UEA eniris la dokumenton ankaŭ alineo, en kiu la konferenco rekonas, ke biodiverseco kaj lingva diverseco estas ne-disigeblaj, konektitaj kaj interdependaj, kaj alarmas pri la perdo de tradiciaj scioj kiel sekvo de la perdo de lingva diverseco. La fina teksto ankaŭ alvokas la ŝtatojn antaŭenigi adekvatan lingvan politikon kiu atentigas la bezonojn de la nuna kaj estontaj generacioj. Mencioj pri la graveco de lingva politiko por daŭripova evoluo kaj pri la valoro de kultura, lingva kaj etna diverseco estis aldonitaj plurloke. Interalie, la konferenco kuraĝigas evoluigi indikilojn ankaŭ pri lingva kaj kultura diverseco por mezuri la progreson al verda ekonomio.

Signifo de la deklaro

Kvankam la deklaro de la NRO-konferenco en si mem ne reprezentas sintenon de UN, ĝi aperos en la dokumentaro de UN kaj havas valoron kiel morala premo de la civila socio al la monda organizaĵo. La partoprenintaj NRO-j direktis ĝin tute aparte al la konferenco “Rio + 20”, en kiu ĉeestos ankaŭ UEA laŭ ĵusa decido de la Estraro. UEA partoprenos ankaŭ en la venontjara UN-konferenco de NRO-j, pri kiu en Bonn oni esprimis la deziron, ke ĝi okazu en Mez-Oriento, Nord-Afriko aŭ araba lando.

Dokumentoj, videoj kaj fotoj pri la konferenco:

<http://www.linguistic-rights.org/eventoj>

Esperanto-ekspozicio en Aŭstralio

En la urbo Adelajdo, Aŭstralio, okazis dum de la 11-a de septembro kaj ĝis la 2-a de decembro ekspozicio pri Esperanto en la Muzeo de Migrado memore al la unua aŭstralia Kongreso de Esperanto, okazinta en 1911 ĝuste en Adelajdo.


La malferma ceremonio de la 12-a de septembro estas spektebla en tri partoj ĉe Youtube (serĉu per “esperanto ekspozicio adelajdo”). Laŭ la ekspozicia retpaĝo, la tiama urbestro Lewis Cohen eldiris ke

“La intenco de la Esperantistoj ne estis pensi iel malpli en ilia denaska lingvo, sed kultivi ĝeneralan konon de universala lingvo, kiu estus granda helpo al la (tuta) homaro.”

Ekspozicia retadreso:

<http://history.sa.gov.au/migration/exhibitions/Esperanto.html>

[laŭ Henri Masson]



Subteno al Vikipedio

En ĉiuj vikipediaj paĝoj, en Esperanto aŭ en aliaj lingvoj, dum periodo aperis alvoko de la fondinto de Vikipedio, Jimmy Wales, petante donaceton por la subteno de tiu entrepreno.

Estus bone se ĉiuj Esperanto-asocioj en la mondo, laŭ internacia, nacia, aŭ loka skalo, sendus laŭ sia financa kapablo donaceton por Vikipedio, kiu havas gravegan rolon por esperantistoj kaj por la diskonigo de nia lingvo.

Tio aldonus prestiĝon rilate al Esperanto en la estraro de Vikipedio.

La esperanta movado ŝuldas eternan dankemon al la kreintoj de Vikipedio, inter kiuj troviĝas Chuck Smith, kreinto de la Esperanta Vikipedio. Ne nur temas pri paĝoj en nia lingvo: kiam homoj el iu ajn lingvo rigardas gravajn vikipediajn paĝojn ili ofte povas konstati ke ankaŭ ekzistas versio en Esperanto de tiuj paĝoj, tio montras al ili ke nia lingvo ne estas ia etera fantazio. Tial estus ĝentile priatenti la alvokon de Jimmy Wales kaj kontribui per modestaj donacetoj al tiu entrepreno.

Donacejo: <https://wikimediafoundation.org/wiki/Donate/da>

Dario Rodrigez

La unua Esperanta Kinofestivalo

De la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en San-Paŭlo, Brazilio, okazis la unua Esperanta Kinofestivalo enkadre de Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE). Por la festivalo estis alsenditaj 21 videaĵoj el 13 landoj en tri kategorioj: 5-, 15- kaj 30-sekundaj filmoj.

Pri la 1-a Esperanta Kinofestivalo “Kino sen limoj” Rogener Pavinski muntis belan video-raportaĵon, videblan ĉe:

<http://www.youtube.com/watch?v=JRILqbQt5Us>

Ni invitas vin spekti ĝin. Se ĝi plaĉas al vi, bv. diskonigi ĝin. Per tio ni kreas komunumon, kiu kontribuos al la sekva kinofestivalo.

Modela analiza raporto post la aranĝo

Aleksander Osincev (alex.osintsev@gmail.com), organizulo kaj motoro de la Esperanta Kinofestivalo pretigis analizan raporton pri la tuta aranĝo. Ĝi estas trovebla ĉe:

http://vikio.filmoj.com/_media/wiki:analiza_raporto_14.09.pdf

La dokumento donas detalan raporton pri la evento, rakontas pri la sukcesaj kaj malsukcesaj partoj, analizas ilin por perfektigi la organizadon de la sekvaj tiaspecaj eventoj kaj helpi eviti grandajn problemojn, donas konkretajn informojn pri la buĝeto kaj kolektas konkludojn.



La raporto inkluzivas ankaŭ rezultojn de enketado de spektantoj. Entute la profesia metodo pretigi postfestivalan resuman raporton, kaj ĉefe ĝia stilo kaj enhavo povas servi kiel modelo por multaj organizantoj de Esperantaj renkontiĝoj kaj projektoj...

Szilvási László [ret-info]

La stato de aŭtomata tradukado

La aŭtomata tradukado en Esperanto evoluas tre forte. Tagon post tago, oni vidas ĝin plibonigita kaj portanta grandan publikigadon al la reto. Hodiaŭ ni havas: Traduku.Net, WikiTrans - Esperanto, GramTrans, Vikitrdukilo versio 0.1, Apertium

Tamen, unu el la plej amase produktantaj retejoj estas WikiTrans. Jen kiel ĝi priskribas sin mem:

La WikiTrans-projekto estas esplor- kaj evoluigo-projekto de la dana lingvoteknologio-firmao GrammarSoft ApS, kunlabore kun University of Southern Denmark (Suddana Universitato). La ĉefa celo de la projekto estas permesi trans-lingvan uzadon de Vikipedio-artikoloj, pere de paralela tradukita retejo.

Ĉu vi povas kredi kiom da artikoloj estis tradukitaj de tiu retejo? ... 8.497.158!

Jes, 8,5 milionoj da artikoloj en Esperanto. Tio estas absolute mirinda informo, kaj plie, la kvalito de la tradukoj estas jam altnivelaj. Vi povas legi ilin miriade kaj retligite en belaspektaj paĝoj, sen kiu ajn problemo rilate al la kompreno de Esperanto. La nivelo de la lingvo estas ja bonega kaj bonstila. Miraklo de la tekniko, ĉu ne? Se ni ne estas grandamasa ularo en Esperantujo, aliaj bitaj uloj plensvarme laboregadas en nia medio. Konsekvence, nun, ni povas haste progresadi ene de Vikipedio.

El kiu venis tiom da tekstoj?

Bone... el la angla Vikipedio (3 milionoj da artikoloj) kaj el la dise ellaborataj tekstoj en la reto. Danke al la internacia angla ni havas multon en Esperanto, ĉu ne? La internacia angla multe helpas rekte nian propran Esperanton kaj preparas ĝin al informriĉa kaj plenkvalita estonteco de demokratia interkompreno, disponigante amase la mondan literaturon: informada, teknika aŭ beletra. Sufiĉe elokventa rezulto!

Se ni metos nun en guglo-traserĉilon ("kaj ĉu"), ni vidos, sub la traserĉilejo, ke 7 milionoj kaj multaj miloj tuj aperas. Nun ni scias kial ni havas tiom da paĝoj en la reto. Jen la vero por niaj gapaj okuloj: ili venas el niaj bitaj samideanoj.

Adonis Saliba

Grundtvig en Sicilio

La 17an de novembro 2011 la Itala Nacia Agentejo de la Programo de Tutviva Lernado komunikis la aprobon de seminario Grundtvig, proponita de la Itala Instituto de Esperanto, kun la temo «Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof».

La seminario okazos de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2012 en la sicila urbo Mazaradelvalo, kadre de la 79-a Kongreso de Esperanto en Italio. Ĝi estos financita per 36.120 € kaj ĝi analizos la aktualecon de la pensadoj de Zamenhof, kun granda atento al multkulturismo kaj al pluretna mondo, kun rektaj ligoj al Esperanto-spertoj.

Denove ĝojiga sukceso por Kosmo, esperantista entrepreno kiu prizorgis la pretigon de la projektpropono, kunlabore kun la Itala Instituto de Esperanto (IIE). «Per tiu ĉi plia sukceso ni pliproksimiĝas al la ronda cifero de 200.000 € akiritaj por Esperanto-agado» komentis Bruĉjo Kasini, kun-direktoro de Kosmo kaj jam konata esperantisto ankaŭ per la eldonejo Edistudio. Prof. Fabrizio A. Pennacchietti, prezidanto de IIE, komentis: «Tiu ĉi sukceso montras ke Esperanto-organizoj havas la eblecon akiri subvenciojn por financi siajn agadojn. Ĝi estas rekono de la plurjara agado de IIE en la kampo de plenkreskula edukado. Ni atendas vin en Mazaradelvalo!»



Kosmo Strategio Ltd. estas skota esperantista entrepreno, kiu celas helpi la Esperanto-mondon akiri subvenciojn, mastrumi projektojn, plani agadojn. Oficiale registrita en aprilo 2011, ĝi havas kvar kunlaborantojn kaj havas rilatojn kun dekoj da organizoj, universitatoj kaj mal-mez-grandaj entreprenoj – ne nur Esperantistaj. Lastan monaton ĝi ĵus lanĉis partneran projekton inter Svisa Esperanto-Societo, Kataluna Esperanto-Asocio,

Germana Esperanto-Asocio kaj Esperanto-France, financita per 69.000 €.

«Mi estas tre feliĉa ne nur kiel entreprenisto, sed ĉefe kiel esperantisto! La kongreso en Mazaradelvalo estos granda ŝanco por relanĉi la Esperanto-movadon en Sicilio, kun favora subteno de la urbaj instancoj. Tiu ĉi subvencio certe helpos», aldonis Francesco Maurelli, kundirektoro de Kosmo.

Se vi aŭ via organizo interesiĝas, bv. kontakti oficejo@kosmo.eu.com. En februaro estos interesaj limdatoj por Esperanto-organizoj, kiel ekzemple propono pri seminarioj aŭ pri partneraj projektoj. Ni ne lasu tiun monon nur al ne-esperantistoj.

Pli da informoj pri la 79a Kongreso de Esperanto en Italio:

kongreso.esperanto.it

Kosmo Strategio Ltd.

oficejo@kosmo.eu.com

IKU invitas prelegontojn

Dum la 97-a UK en Hanojo okazos la 65-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete: amri@huji.ac.il, ĝis 2012-01-31.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝitaj de la IKU-komisiono

[Ret-Info]



Tatoeba: 100 000 frazoj en Esperanto

Vortaroj tradukas vortojn, la frazaro <http://www.tatoeba.org> (“tatoeba” estas la japana vorto por “ekzemple”) tradukas kompletajn frazojn por prezenti la vortojn en kunteksto. Se oni serĉas tradukon de vorto, oni enmetas tiun kaj la deziratan cellingvon; Tatoeba prezentas ekzemplojn de tradukado.

Tria loko por Esperanto

Pasintjule Esperanto havis proksimume mil frazojn en Tatoeba. Post konigo de la retejo en Esperanto-rondoj la nombro de Esperanto-frazoj forte kreskis, kelkfoje per 500 frazoj en unu tago. Hodiaŭ nia lingvo atingis 100 000 frazojn el entute ĉ. unu miliono da frazoj ĉe Tatoeba.

Esperanto jam delonge okupas la trian lokon inter la aktuale 94 lingvoj de la retejo. Antaŭ Esperanto troviĝas nur la du lingvoj, per kiuj la frazokolektado komenciĝis, nome la angla kaj la japana kun ĉ. 203 000 kaj 159 000 frazoj respektive.

Kiucele?

Kelkfoje oni demandas pri la senco de la tuta agado. Unuflanke la kontribuantoj klopodas trovi tradukojn por ĉiaj eblaj frazoj kaj tiel helpi al serĉantoj de tradukoj. Aliflanke estas defio sukcesi en la traduka tasko. Trie kompreneble oni volas eluzi la eblecon montri la potencon de Esperanto kaj iom varbi por ĝi per la simpla apero en la listo.

Ofte progresantoj en lingvo-kurso tradukas frazojn nur por ekzercado – poste oni forĵetas la rezulton. Tatoeba donas la eblecon kombini la klopodadon pri bona traduko kun kontribuo al io pli longdaŭra. Kaj temas pri tempe mallonga tasko – unu frazotraduko ĉiutage certe ne tro ŝarĝas, ĉu? Kompreneble necesas jam antaŭe interkonsenti pri reviziado fare de lingva spertulo – Tatoeba ja celas prezenti altan kvaliton de la tradukoj.

Tradukokvalito

Por gardi la kvaliton de la tradukoj en Tatoeba ekzistas du ĉefaj rimedoj: Unuflanke ĉiu frazo havas "posedanton", kiu sentu sin respondeca pri ĝi. Aliflanke ĉiu uzanto povas fari komentojn pri la tradukoj kaj tiel instigi al ŝanĝo.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

9-A KONGRESO DE EEU - IRLANDO 2012

kiam?

16. - 20. 07. 2012

WWW.EUROPO.EU

informiĝu! aliĝu!

organizas

EŬROPA ESPERANTO-UNIO

urbo

GALIVO / GAILLIMH / GALWAY

lando

IRLANDO

temo

LINGVOLERNADO EN EU: LERNI PLI, KOSTI MALPLI

